



SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

Jarkongreso de Västerås	47
Efika Informado, parolado de Ib Schleicher	49
Recenzoj	50
Dormogenoj ĉe alt-aĝuloj	51
Adriansson: Naturo Re-sana	52
Mirinda Vivosorto	54
Unesko-Novaĵoj	56

Abono 20 sv. kr.

Postgiro: SEF 20 12-3

4

1972

60-a jaro

RESOLUTION

Till Svenska Unescorådet.

Svenska Esperanto-Förbundets årsmöte i Västerås 20—22 maj 1972 har beslutat anta följande resolution.

Den svenska riksdagen har år 1965 enhälligt beslutat uppdra åt regeringen att i Unesco ta upp frågan rörande ett internationellt språk.

Den svenska delegationen vid Unesco har med stöd av de övriga nordiska delegationerna väckt ett gemensamt nordiskt förslag om denna fråga i generalförsamlingen.

Läget synes emellertid vara det att generalförsamlingen ännu inte fört upp förslaget på dagordningen.

Årskongressen kräver därför

att den svenska delegationen vid Unesco åter söker föra upp frågan om ett internationellt språk på organisationens dagordning i enlighet med den svenska riksdagens beslut.

LA REDAKTORO:


En sia tre bona kaj pripensinda prelego je la jarkongreso de SEF en Västerås, la prezidanto de CDEL, Ib Schleicher, substrekis ke ni, se ni deziras interesigi aliajn organizaĵojn por Esperanto, devas konvinki ilin, ke nia lingvo povas esti utila por la celoj de ĝuste tiuj organizaĵoj. Ili ja havas aliajn celojn ol ni. Ni ne rajtas atendi, ke ili interesiĝos pri la disvastigo de Esperanto se ili ne trovos, ke tio utilis al ili.

Antaŭ iom da tempo atingis al la redakcio numeron 2/1971 de PACO, la organo de Mondpaca Esperantista Movado. Tiu numero, ampleksa (63-paĝa), lukse presita kun multaj ilustraĵoj, estas eldonita de esperantistoj en Sovet-Unio. La enhavo respegulas la oficialan sovetan sintenon rilate al la mondpolitikaj problemoj.

El la fora Oriento regule atingas nin EL POPOLA ĈINIO, monata revuo, ankaŭ lukse presita kun belaj, eĉ koloraj ilustraĵoj, kaj multaj artikoloj pri la moderna Ĉinio kaj la vivo tie. Kompreneble la enhavo konformas al la oficiala politiko de la ĉina registaro.

Multaj esperantistoj en okcidento havas tre negativan sintenon rilate al tiuj eldonaĵoj el oriento. Ili opinias, ke tiuj revuoj estas propagandiloj por la reĝimoj en la koncernaj landoj. Oni certe pravus! Ili estas! Sed ĉu tio estas manko? Ni devas tamen kompreni, ke niaj gesamideoj tie devas, se ili entute volas labori por Esperanto, utiligi nian lingvon prezentante al la tutmonda esperantistaro la vidpunktojn de ilia registaro. Ĉu tio ne estas la sole ebla vojo, se ni volas iam atingi tutmondan akcepton de Esperanto? Aŭ ĉu ni imagas al ni, ke ni unue ŝanĝu la mondon tiel ke ĝi konformos al niaj politikaj konceptoj?

S-ro Schleicher postulis pli da realismo en nia sinteno al la ekstera publiko. La sovetaj esperantistoj malantaŭ tiu eldono de PACO kaj la ĉinoj malantaŭ EL POPOLA ĈINIO meritas nian estimon kaj apogon. Ili estas realistoj! Kial ni ne sukcesas same utiligi nian lingvon por la celoj de niaj registaroj kaj niaj politikaj kaj ideaj organizaĵoj?



JULIO-AUG. 1972

Numero 4. 60-a jaro

PROF. LAPENNA PRI "IDEOLOGIAJ ŜANĜOJ ..."

Estimata kaj kara sinjoro Blomberg,

Mi ĵus legis en "La Espero", ke antaŭ nelonge vi fariĝis 50-jara. Okaze de tiu duonjarcenta datreveno — mi havis ĝin jam antaŭ sufiĉe longe, bedaŭrinde — mi esprimas al vi, en la nomo de UEA kaj en mia propra, tutkora gratulon. Samtempe mi deziras al vi forton kaj sanon, konvinkita, ke ili fruktos al vi ankaŭ en via utila kaj fruktodona laboro por nia komuna afero.

En la sama numero mi legis la duan parton de la artikolo de s-ro Forster pri "Ideologiaj ŝanĝoj en la Esperanto-Movado". La artikolo estas interesa, kvankam multrilate la aŭtoro aŭ tro simpligas la aferojn aŭ lia analizo estas parte malĝusta. Tio speciale rilatas al la periodo post la Dua Mondmilito. Tute izolata opinio — ekzemple tiu de "Verdiro" — neniel povas esti prenita kiel karakteriza, ankoraŭ malpli kiel esprimo de iaj tendencoj, fakte ne ekzistantaj. Tamen, mi ne deziras diskuti pri tiu aspekto.

Aliflanke, mi ne povas ne atentigi pri almenaŭ du punktoj en ligo kun la rilatoj inter UEA kaj Unesko:

1. Skribante pri la konata Rezolucio de Unesko en 1954, la aŭtoro el-lasis, certe neintence, ĝian esencan parton, nome ke la Generala Konferenco "notis la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampoj de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo", kaj "rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko". Tiuj celoj kaj idealoj, entenataj en la Konstitucia Akto de Unesko kaj en ĝia Baza programo estas: defendo de la paco per pli bona kompreniĝo inter la popoloj kaj per la respektado de la Homaj Rajtoj; disvastigo de kulturo kaj edukado; intelekta kaj morala solidareco de la homaro; interŝanĝo de ideoj, scioj kaj personoj; internacia kunlaborado sur la kampoj de edukado, scienco kaj kulturo; venkado de malfacilaĵoj, kiujn kreas la diverseco de lingvoj; progresigo de edukado al monda civitaneco; diskonigo de klasikaj kaj nuntempaj verkoj per tradukoj; faciligo de libera disvastigo de ideoj skribe, parole kaj vide... Tiu rekono de la Generala Konferenco de Unesko estas sendube la plej grava kaj elstara en la tuta historio de la Internacia Lingvo. La instrukcio donita al la Generala Direktoro "sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo" kaj "kunlabori

kun UEA pri aferoj, kiuj koncernas ambaŭ organizaĵojn", estas nur logika sekvo de la menciita principa rekono. P. G. Forster ne rimarkis tion.

2. En la kunlaboro de UEA kun UN, kaj speciale kun Unesko, la Asocio ja celebris la Tagon de Homaj Rajtoj kaj Tagon de Unuigintaj Nacioj, kion la aŭtoro korekte mencias, sed ĝi ankaŭ partoprenis, kun propraj programoj, en la agadoj ligitaj al la Jaro de Internacia Kunlaboro, Internacia Jaro de Edukado, Granda Projekto Oriento-Okcidento k. a., inkluzive la nunan grandan kampanjon "Internacia Libro-Jaro". Ĉio-ĉi estas "aferoj, kiuj koncernas ambaŭ organizaĵojn", konforme al la Rezolucio de 1954, kaj UEA vaste utiligis la eventojn por atentigi pri la hodiaŭa lingva problemoj, por diskonigi la Internacian Lingvon kaj disvastigi ĝin.

Esperante, ke vi povos publikigi tiun ĉi leteron en la sekvanta numero de "La Espero", mi restas kun bondeziroj kaj koraj salutoj,

sincere via

Ivo Lapenna

Prezidanto de UEA

★

PRI LETEROJ DE W. H. TROMPETER

S-ro Adolf Holzhaus en Colombus, Usono, preparas novan eldonon pri sia libreto "W. H. Trompeter". Pro tiu kialo li deziras kopiojn de libroj, kiujn Trompeter skribis al aliaj pioniroj de la esperantomovado, ekz. al Per Ahlberg, Henrik Backman, Gustav Henriklundqvist, Valdemar Langlet, Paul Nylén, Karl Otto Svambom, Harald Thilander kaj Otto W. Zeidlitz. Se vi scias pri la ekzisto de tiaj leteroj, bonvolu sendi kopiojn al Karl Söderberg, Luthagsplanaden 15 A, 752 25 Uppsala, kiu plusendos ilin al s-ro Holzhaus.

★

BONA PROPAGANDO

En la radioprogramo "fredagskväll" la 26-an de majo s-ino Martha Colliander estis gasto. Ĉe la demando de la intervjuanto Mona Krantz, s-ino Colliander rakontis ke unu el ŝiaj grandaj interesoj estas Esperanto, kaj ke ŝi pere de tiu lingvo havis okazon multe vojaĝi kaj eblecon kontakti multajn homojn, eblecon kiun oni ordinare ne havas. S-ino Colliander cetero substrekis ke estas necese havi internacian lingvon por krei interkomprenigon inter la popoloj.

19



72

V Ä S T E R Å S

La jarkongreson 1972 en Västerås karakterizis antaŭ ĉio la laboro. Pli ol aliaj jarkongresoj de SEF ĝi estis laboranta kongreso. Iel ĝi havis ankaŭ "nordlandan" atmosferon, ĉar partoprenis oficialaj reprezentantoj — prezidantoj aŭ sekretarioj — de niaj tri najbaraj landaj asocioj. La jarkunsido mem de SEF pasis relative rapide, kaj tie ne okazis iaj sensaciaj aferoj. Sed poste oni diskutis la gravan demandon pri komuna nordlanda gazeto kaj en la posttagmezo de la pentekosta tago Ib Schleicher enkondukis la gruplaboron kaj diskutojn pri Efika Informado. Tiuj diskutoj daŭris en la Dua Pentekosta Tago, kaj anstataŭ pli longan ekskurson oni aranĝis kiel finon de tiu ĉi jarkongreso mallongan sed belan kunestadon post promenado al la pinto de Djäkneberget meze de Västerås.

Aranĝi kongreson en urbo kie esperantosocieto tute mankas estas riska entrepreno. Tio okazis jam en Jönköping en 1970 sed tie tamen troviĝis sufiĉe multaj lokaj esperantistoj, kiuj faris le ĉefan laboron. En Västerås tute mankas tiaj gesamideoj — kun unu escepto — kaj la laboro devis esti farata de la stokholmaj membroj de la federacia estraro. Krome, ĉar ne troviĝas lokaj espe-

rantistoj oni ne povas atendi iujn partoprenantojn el la loko mem. Tial estas ĝojige, ke la nombro da partoprenantoj en Västerås preskaŭ atingis cent.

La solena malfermo de la jarkongreso en la Pentekosta Vespero en la regna salono de la kastelo de Västerås estis bela kaj inda aranĝo, kaj al la feste solena atmosfero konsiderinde kontribuis la muzika enkadriĝo por kiu respondecis Roland Dupuis. Ragnar Hjorth, vic-prezidanto de SEF, funkciis kiel prezidanto de la estrara LJK kaj bonvenigis la partoprenantojn.

Poste bonvenigis la kongresanojn la prezidanto de la urba konsilantaro, Erik Pettersson. Li konstatis ke Västerås fakte estas urbo internacia. La grandaj industrioj tie altiras gastlaborantojn aŭ enmigrintojn el ĉiuj partoj de Eŭropo kaj la lingvaj malfacilaĵoj estas evidentaj. Esperanto estus bona helpilo. Ankaŭ por ni en la urba estraro, diris s-ro Pettersson, internacia lingvo komuna por ĉiuj estus solvo de vere grandaj problemoj. "Neniam mi sentas min tiel malriĉa kiel je renkontiĝoj kiam mi ne povas interparoli kun la partoprenantoj. Interpretisto ne forigas tiun senton."

Jan Strönne, prezidanto de SEF, transprenis la parolon kaj dankis al

la prezidanto de la urbo kaj al tiuj estraranoj, kiuj laboris en LJK.

Post supeo kun danco en la granda mangosalono de la Urba Hotelo oni kolektiĝis en aparta salono de la hotelo por festa kunestado. Salutis la jarkongreson la eksterlandaj gastoj: Ib Schleicher por Centra Dana Esperantista Ligo, Støp-Bowitz por Norvega Esperanto-Ligo, s-ino Rees por la Esperantoklubo de Oslo kaj Jorma Ahomäki por la Esperanto-Asocio de Finnlando. Alia gasto, s-ro Allinger el Nov-Zelando alvenis kaj salutis al la kongreso en la Pentekosta Tago.

Roland Dupuis prezentis poste lumbild-muzik-programon pri Parizo. En tiu mallongigita formo en kiu tiu programo — pro manko da tempo — estis prezentata tie, ĝi atingis, laŭ multaj gekongresanoj, preskaŭ perfektecon. La belaj koloraj bildoj, la zorge elektita kaj virtuoze prezentata muziko kaj la muzika lingvo mem kiu estas karakterizaĵo por Roland Dupuis, ĉio kunfandiĝis kaj donis al la partoprenantoj neforgeseble belan travivaĵon. Entute la piano-muziko de Roland Dupuis tre multe signifis por la enkadriĝo de tiu ĉi jarkongreso.

Pri la jarkunsido de SEF, pri la diskuto pri komuna nordlanda gazeto kaj pri la parolado de Ib Schleicher kaj la diskutoj, kiuj sekvis ĝin, ni

aparte raportas. La spaco ne permesas al ni pli detale komenti la distran programon, kiun prezentis esperantistoj el Stokholmo, Norrköping kaj Kungälv post la te-supeo en la Pentekosta Tago. Ni vidis oficialan turistan filmon pri Västerås, ni aŭdis nepreparitajn parolantojn — tamen ne tute nepreparitaj — ni divenis en muzika ŝarado k. t. p. Tamen — ni havu kiom ajn malmulte da spaco — ni ne povas eviti la majstran prezentadon fare de Gun Gerdman kaj S. Szabad de la teatraĵeto "El la kongresoj de esperantistoj" de Raymond Schwartz. La temo mem estas tre danka, kaj la prezentado estis vere tre bona.

La diservo ne plu estas ero de la oficiala kongresprogramo — ne ĉiuj kongresanoj deziras havi tian aranĝon. Je la matena di-servo en la Pentekosta Lundo tamen la plej multaj partoprenis. Pastro Kuno Åberg predikis en Esperanto kaj Georg Sundman solkantis.

Kaj la fino estis — kiel ni jam diris — la kafo sur la pinto de Djäkneberget, kie Jan Strönne ankoraŭfoje dankis al la komitatanoj, kiuj multe laboris por la kongreso. Kaj ni konkludu — ili povas senti sin fieraj, ĉar ili faris bonegan laboron!

Fine ni nur menciu, ke la loka gazetaro montris grandan intereson por la aranĝo. Västmanlands läns Tidning salutis la kongresanojn en Esperanto kaj post la kongreso aperis en ĝi longa artikolo pri la okazaĵo.

obo

JARKUNSIDO DE SEF

Ĉar estis mia tasko kiel vic-prezidanto de la jarkunsido de SEF gvidi la traktadojn kaj ĉar mi ne sukcesis trovi alian raportanton, kiu pli bone ol mi estus povinta fari notojn, mi permesas al mi tutsimple prunti kelkajn frazojn el la konciza kaj objektiva raporto kiun aperigis Oskar Svantesson en sia MUNDO. Tamen mi ĉi-sube enmiksas kelkajn proprajn konstatojn.

La veraj traktadoj okazis en la dua tago, kun komenco pri la jarraporto de la estraro. La plej multaj punktoj en ĝi ne okazigis diskutojn. Lennart Åberg estis telefone espriminta sian miron, ke la jarraporto mencias pri kelkaj aranĝoj kaj agadoj en Gotenburgo sen informi, kiu fakte agis, nome INTER. Svantesson konfirmis, ke Agadgrupo Inter estas tiu kiu informis la instruistojn, kontaktiĝis kun la Kursagado en la Universitato de Gotenburgo, aranĝis la esperantosemajnon, okazigis ekspozicion en la Urba Biblioteko dum ses semajnoj,

faris informbroŝuron pri Gotenburgo kaj eĉ aranĝis grupvojaĝon al la londona kongreso.

Pri la Sveda Esperanto-Instituto raportis Karl Söderberg, ke la agado lastatempe ne estis tute kontentiga. La forpaso de Ernfrid Malmgren estis por la Instituto granda perdo. Li tamen kredis, ke oni de nun pli bone regos la situacion.

La ekonomia raporto montris, ke SEF ankaŭ por la pasinta jaro havis deficiton. La kasisto, Sven Alexandersson, atentigis ke la altigo de la membrototizoj efikas nur ek de 1972, kaj la revizoroj substrekis, ke tiu altigo nepre devos forigi la deficiton en tiu ĉi jaro.

La jarkunsido unuanime reelektis Jan Strönne kiel prezidanton por 1972, kaj ankaŭ la tri estraranoj, kies mandatoj finiĝis, estis reelektataj, nome Sven Alexandersson (kasisto ek de 1972), Ragnar Hjorth kaj Franko Luin. Kiel anstataŭantoj anstataŭ Artur Malmkvist kaj Maria Wästfelt estis elektataj s-ino Märtha Andreasson, Hisings Kärra, kaj Nils Johansson, Norrköping. Revizoroj: Jack Snarberg kaj s-ino Eva Törnskog. Pri ceteraj elektoj ni nur menciu, ke la elektoprepara komitato por la jarkongreso 1973 konsistas el Tomas Jansson (kunvokanto), s-ino Gun Gerdman kaj f-ino Aino Mäkinen.

La jarkunsido unuanime akceptis rezolucion direktita al la Sveda Unesko-Konsilantaro (ni publikigas ĝin aparte). Propono de Szabad pri skribaĵo al la Sveda Radio pri esperantokurso estis transdonata al la estraro por pritrakto.

Nils Kindgren, Kalmar, invitis en la nomo de la klubo de Kalmar la jarkongreson 1973 al tiu urbo, kie oni tiam povos rigardi i. a. la novan ponton inter Kalmar kaj Öland. La jarkongreso kun danko akceptis la inviton.

Ake Blomberg

★

DISKUTO PRI KOMUNA NORD- LANDA GAZETO

La demando pri komuna nordlanda esperantogazeto estis pritraktata ne nur en la ĝenerala diskutado tuj post la jarkunsido de SEF sed ankaŭ en du apartaj kunvenoj por la estraranoj de SEF kaj la reprezentantoj de Danlando, Norvegujo kaj Finnlando. La problemoj estas evidente grandaj kaj oni ne atingis al iu decido, sed la esploroj kaj interdiskutoj daŭros.

La ĝenerala diskuton en la Pentekosta Tago enkondukis Franko Luin, unue atentigante pri la faktoroj, kiuj

parolas por nordlanda gazeto: 1) La ebleco kunigi la raportojn pri la Universalaj Kongresoj kaj aliaj eventoj anstataŭ, kiel nun, fari tri aŭ kvar apartajn raportojn. 2) La enhavo povus esti interesa por ĉiuj landoj, oni povus interŝanĝi ideojn. 3) La financa situacio. La nunaj tri gazetoj (Finnlando apenaŭ havas iun) postulas tro grandan parton de la enspezoj de la federacioj. La kunigo de la fortoj kaj la pli granda eldonnombro (ĉirkaŭ 4000 ekz., La Espero nun aperas en 2000 ekz.) malpliigus la kostojn.

Franko Luin fine akcentis, ke kunigo de la nunaj tri gazetoj en unu komunan kompreneble estas ankaŭ risko, granda risko.

Parolis poste la reprezentantoj el la aliaj nordaj landoj.

Ib Schleicher, prez. de CDEL, opinias ke estas granda perdo uzi la plej grandan parton de la membrototizoj por eldono de gazeto. Oni devas aŭ redukti la kostojn aŭ altigi la enspezojn. Li diris tamen ke Danlando eble jam solvis la problemon, sed ke oni tie ne volas malhelpi starigon de komuna gazeto, se tio montriĝos dezirinda.

Stop-Bowitz, prezidanto de NEL, diris ke la norvegaj esperantistoj havas gravajn, precipe ekonomiajn, motivojn por voĉdoni por komuna gazeto. Li tamen esprimis ioman timon, ke ĝi povos fariĝi nur ankoraŭ unu internacia esperantogazeto, ĉar ĝi ja devas esti tute en Esperanto. Pri la nuna norvega organo li diris, ke montriĝis, ke la klubnoticoj apartenas al la plej multe legata materialo en la gazeto. La kluboj en tiu maniero interŝanĝas ideojn. Oni ankaŭ faris interkonsenton kun la fervojistaj esperantistoj pri aparta paĝo en la gazeto, kaj ankaŭ tiu estas tre satata.

Plej pozitiva estis Ahomäki, sekretario de la finnlanda asocio, ĉar en Finnlando oni ne havas propran organon por la esperantomovado. Eble estus konvene komenci la kunlaboron tiel, ke la finnoj disponos pri spaco en La Espero.

En Svedujo aperis duboj pri komuna gazeto kaj la klubo de Hästveda sendis al la redaktoro leteron raportante pri kunveno, kie oni diskutis la aferon. Montriĝis ke el 50 ĉeestantoj nur 2 estis por kaj almenaŭ 45 kontraŭ la propono.

El aliaj partoprenantoj en la diskutado Ake Blomberg akcentis, ke oni devas rigardi la problemon unuavice el ekonomia vidpunkto. La konstante plialtigantaj kostoj por La Espero estas granda problemo.

Norling en Uppsala estis principe por komuna gazeto, sed li opiniis ke la realigo estas ankoraŭ tro frua.

obo

EFIKA INFORMADO

Kion Ni volus? — Kion Ni povus?

S-ro Ib Schleicher, inĝeniero, prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo, liveris je la jarkongreso de SEF paroladon pri "Efika Informado", kiu vere instigis al viglaj diskutoj ne nur en la gruplaboro, organizita tuj post la prelego, kaj en la komuna kunveno en la Pentekosta Lundo sed ankaŭ je vesperaj kaj noktaj pli privataj renkontiĝoj en la "koridoroj".

Ib Schleicher enkonduke diris, ke ni devas analizi la eblecojn kiujn ni havas, precipe la eblecojn en la estonteco. Kie troviĝas la estonteco de nia movado? Kie ni devas informi? Kiujn ni volas atingi?

La Esperantomovado, kvankam disvastigita tra la tuta mondo, restas ankoraŭ relative sensignifa movado, tre malmulte atentigata ekster la propraj rondoj. La kluboj ofte estas nur rondoj de ĝeamikoj, kiuj regule renkontiĝas por diskuti proprajn aferojn, anstataŭ dinamika centro de agado. Niaj financaj rimedoj estas tute nesufiĉaj por grand-skala agado kaj ili restos tiaj ĝis kiam ni sukcesos atingi al la publikaj kasoj". La membrototizoj neniam povos solvi niajn ekonomiajn problemojn.

Se ni volas pli grandskale agi, ni devas rompi nian izolitecon kaj vekti la intereson de la ekstera publiko, ne nur interesi kelkajn unuopulojn por ke ili poste aliĝu al ni. La Esperantomovado ne devas ĉiam resti kvazaŭ en ĉelo. Ni devas provi transformi nian movadon en modernan servo-organizaĵon, praktike utila al la ordinara homo. Utila tuj, hodiaŭ, ne nur iam en fora estonteco. Ne sufiĉas prezenti Esperanton kiel la lingvon de la estonteco. La ordinara homo ne havas intereson pri la estonteco.

S-ro Schleicher prezentis longan liston de agado, donante al la aŭskultantoj tempon noti la diversajn punktojn. La spaco ne permesas al ni tie ĉi ripeti la tutan liston, ni limigas nin je la ĉefrubrikoj kaj kelkaj komentoj:

Rezultoj

Ni devas klarigi al ni mem kiujn rezultojn ni volas atingi. Ĉu nur simpatian sintenon kaj intereson flanke de la informatoj? Aŭ ĉu nia informado celas konvinki? Konvinki la informatojn tiel, ke ili mem lernas nian lingvon? En la lasta okazo ni devas ankaŭ scii, kion ni deziras de ili: nur uzadon de Esperanto aŭ ĉu ankaŭ aktivan agadon por ĝi? Ni devas distingi inter uzantoj kaj agantoj. Ne



ĉi, kiu lernas nian lingvon havas emon aŭ talenton fariĝi aktiva organizanto.

Informatoj

Al kiuj ni direktu nian informadon? Ĉu al unuopuloj aŭ al la socio ĝenerale? Ĉu al signifaj grupoj — kiuj influas la ĝeneralan opinion aŭ havas grandan influon en la socio?

Kion informi?

Ni konigu faktojn pri Esperanto. Unuavice pri ĝia praktika uzado, due pri la kvalito de la lingvo, ĝiaj esprimeblecoj, facileco, strukturo kaj lingva evoluo (la linioj, laŭ kiuj evoluas la lingvo).

Eventoj devas esti grava afero en nia informado. Pri eventoj raportas la gazetaro. Sed ili ne unuavice raportas pri eventoj kiuj estas interesaj al ni. Ili deziras eventoj kiuj interesas iliajn legantojn. Sekve ni kreu tiajn eventojn. Kulturaj interŝanĝoj kaj vizitoj de eksterlandanoj estas ekzemploj pri eventoj, konvenaj al la gazetaro.

Kiuj devas informi?

Uzantoj povas informi pri propra uzado de la lingvo, lingvuloj povas konvinki pri la uzebleco de ĝi. Politikistoj influas la ĝeneralan opinion kaj tiujn, kiuj havas potencon en la socio.

Kiel informi?

Personaj kontaktoj ĉiam efikas. Ni devas kontakti kun interesogrupoj kiel ekz. tradukistaj asocioj kaj turismaj rondoj.

Per elsendo de informaj materialoj oni povas rekte informi ekz. opini-formantajn rondojn. Teatraĵoj, publikaj diskutoj kaj ekzpozicioj estas aliaj manieroj de informado, kaj same ĝenerala distribuado de informaj materialoj, gazetara servo k. t. p.

Fine s-ro Schleicher precizigis kelkajn demandojn kaj la ĉeestantoj dividigis je kvar grupoj kiuj aparte diskutis kelkajn el ili. En la dua tago la grupoj raportis pri sia laboro kaj okazis komuna diskuto.

Tomas Jansson raportis, ke lia grupo diskutis pri Forteco kaj malforteco de nia movado. Ili konstatis ke mankas ĉe ni kompetentuloj, laborfortoj, personoj kiuj scias ataki aktualajn problemojn, forta junulara movado.

Ni devas eduki nin mem. La ordinara esperantisto eble eĉ ne mem konas la faktojn, kiuj parolas por la venko de la internacia lingvo. Regas malmalmoderneco en la movado; En tiu grupo oni plendis pro la pasiva sinteno de la federacia estraro. Longtempa laborplano — almenaŭ 5-jara — estas urĝe bezonata.

La dua grupo, el kiu raportis s-ro Alderin Leijder okupis sin pri eventoj, kiuj oni povas konstrui por havi artikolojn en la gazetaro. Ekzemploj de tiaj eventoj estas aranĝoj kunlige al la Semajno de Internacia Amikeco, niaj kongresoj, turismo, agado en la bibliotekoj, partoprenado kun niaj sloganoj kaj flagoj en demonstracioj.

La grupo de s-ro Olle Olsson provis respondi al la demando "Kiuj formas la opiniojn?". Ili konstatis ke la televido grave influas al la ĝenerala opinio, kaj due faras tion la politikaj kaj religiaj gvidantoj.

La grupo de s-ino Märtha Andreasson okupis sin pri niaj eblecoj agi en la ideologiaj movadoj, kaj tiu demando denove kaŭzis diskuton, kiun nur la tempomanko limigis. S-ro Franko Luin akcentis, ke ni devas uzi argumentojn, kiuj konvenas al ĝuste tiu grupo, al kiu ni turnas nin: kristana grupo interesiĝas pri aliaj argumentoj ol ekz. la plej maldekstraj gejunulaj rondoj.

S-ro Schleicher fine akcentis, ke ni devas trovi argumentojn por konvinki aliajn organizaĵojn, ke Esperanto konvenas al iliaj celoj. Ni estu realistoj. Ni komprenu, ke aliaj organizaĵoj laboras por siaj celoj. Por ili Esperanto neniam povos esti celo, nur rimedo. Kion ni povas hodiaŭ proponi al ili, kaj cetere al la homoj ĝenerale, por ke ili havu utilon de Esperanto? Ni devas analizi, kion ni fakte povas fari kaj poste decidi, kiel agi.

obo

RECENZOJ

William Auld: Humoroj. Eldonejo Stafeto. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö, 15: — sv. krj. kun imposto.

William Auld havas multajn kordojn sur sia liro, kaj li arte ludas per ilin ĉiuj. Li havas senton por la naturo, kaj en tiu rilato ankaŭ la homa korpo apartenas al la naturo. Li melankolie salutas la aperintajn grizajn harojn, sed ĉiam estas preta por omaĝo al la virina sekso. Ĉu liaj nunaj versoj spiras rezignon, seniluziigon? Pri socia kaj societa vivo li satirajn bildojn donas.

La multaj nekonataj vortoj ĝenas kaj malhelpas la tujan komprenon. Se oni ne turnas sin nur al koterio da egaluloj evito de tiaj obstakloj estas rekomendinda.

Clelia Conterno Guglielminetti: Eta vivo. Eldonejo Stafeto. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto 15: — sv. krj.

La poemaro komenciĝas per idilio kaj sekureco en konataj rondoj ("knabinaj tempoj"). La meza parto, militaj kaj postmilitaj jaroj, esprimas angoron kaj helpokrion por ŝia amato en germana malliberejo. Fine venas trankvilo kaj matureco. Unu poemo parolas pri mortnaskita infano, sed poste ŝi gajnas la feliĉon de patrineco.

Ŝiaj versoj estas perfekte belaj kaj donas resonon en nia interno. Fortaj sentoj naskis la vortfluron kiel erupcion. La eta vivo estas grandioze rakontita.

Salex

★

Fr. García Lorca: CIGANA ROMANĈARO (trad. Fernando de Diego).

Masao Miyamoto: INVIT' AL JAPANESKO (originalo). Eldonis STAFETO. 110 paĝoj. Prezo ĉe Eldona Societo Esperanto po 15: — sv. krj.

Tre vigla, ofte kuraĝa eldonado kontribuas al la vivoforto de nia lingvo. En ĝian poezian ĥoron ĵus miksis sin du ekzotikaj voĉoj, riĉigo de nia jam amplekse varia kolekto de diverslanda literaturo.

Plaĉa eksterajo, bela preso, valora enhavo. Ambaŭ libretoj havas necesajn, eksplikajn notojn.

De Lorca mi ne konas la originalon, tamen ŝajnas al mi ke la traduko intime sekvas ĝin. Tiel oni certe havas veran impreson pri tiu speciala romantiko:

*Pikaj bekoj de la kokoj
serĉe al aŭroro fosas,
kiam de obskura monto
venas Soledad Montoya.
Je ĉevalo kaj je ombro
ŝia kupra karn odoras.
Brun-ambrose la du mamoj
ĝemas for kanzonon rondan.
— Kiun, Soledad, vi serĉas
sola kaj en denso nokta?
— Tio nur al mi koncernas.
Kial vi ne min ignoras?
Mi feliĉon mian serĉas,
la personon al mi propran.
— Soledad de mia penso,
se ĉevalo tro galopas,
ĝi al maro fine venas,
kaj en ties akvo dronas.*

*Kantas sube la rivero:
franĝo firmamenta, fronda.
Pere du kukúrbofloroj
nova lumo jam sin kronas.
Tristo, ve, del la ciganoj!
Tristo pura, ĉiam sola!
Tristo de subtera fluo
kaj de materiĝo fora.*

* * *

La originalo de Miyamoto estas vera originalo — kiel ankaŭ li mem. Ĉio en lia poezio estas lia propraĵo. Ĉiu vorto, ĉiu verso portas lian stampo. Li donas novan pruvon pri la plastikeco de esperanto. Li estas rimarkinda talento kaj brila peco en la mikskolora mozaiko de nia mondovasta literaturo. Tute aparta stilo, ia subjektiva, eleganta impresismo. Plaŭdas lia poezio kiel japana fontano; ĝi estas muziko. Apenaŭ troviĝas por ĝi koncentrita, adekvata karakterizo, se ne ĝuste — moderna japanesko:

*La maro vastas
sur horizont lontanen
sub plumb ĉiela;
la disvejiĝo pravas,
sed mia junto tamen...*

*Tuj ekploronta
ĉielo plumba — laroj
sur muĝ maronda.*

*Aŭtuna ploro
en vent hejmmara, ankaŭ
en mi la koro.*

*Ĉiel oktobra
kupolas super maro
kun splen pli obla.*

*Nubaro cindra
sur mar hejmloka pendas
ankoraŭ vintra.*

* * *

Vere, por verki poezion necesas vortoj. Por faciligi la aferon oni povas ja eksidi kun krajono kaj ĉerpilo ĉe la senfunda, angla vortomaro. Sed tio ne estas "penlabor ribela". Ribela eble...

Senĉese oni devas serĉadi en vortaroj nekonatajn, netroveblajn vor-

KULTURSTIPENDIO AL ANNA ALAMO-SANDGREN



La studasocio de la svedaj sendependaj eklezioj asignis gravan kulturstipendion al Anna Alamo-Sandgren, de post 1947 aganta kiel dungita informistino de la sveda sekcio de KELI. La stipendio, ĉijare donita por la unua fojo, premias novkreatan kaj pioniran laboron, en la sektoroj de edukado kaj kulturo, koncernanta la aktualajn taskojn de la kristana eklezio.

La studasocia estraro jene motivis sian elekton: "Pro ŝiaj de lerto kaj entuziasmo karakterizitaj, multjaraj kontribuoj per studgvidado, prelegado kaj internaciskala informado — faroj plenigitaj de ĝojo kaj malavareco, inspiritaj de la kristana amo kaj ĝia vizio pri reamikiĝo, paco kaj kunuleco."

Pro la 25-jara oficeco s-inon Sandgren feste honoris ankaŭ la KELI-sekcio mem dum sia jarkonferenco, okazinta en Lundsbrunn la 11—14 de majo.

"Mi sentis min tiel agrable ĉe tiuj homoj simplaj kaj bonaj ke mi havis la iluzion aparteni al la tribo kaj vivi ties feliĉon.

La civilizo povas liveri al ili multajn ĉifonojn, multajn instrumentojn, multe da klero. Sed unu aferon ĝi ne povas doni al ili: la feliĉon. Ĉar ĝi abundas en tiuj vilaĝoj, dum ĝi tiom mankas ĉe ni..."

La citaĵo estas el TRA LANDO DE INDIANOJ, la nova libro de Tibor Sekelj. Ĉu vi ankoraŭ ĝin legis?

Havebla ĉe ELDONA SOCIETO ESPERANTO. Prezo broŝ. 24: —, bind. 30: — plus imposto.

tojn. Ofte la verkisto tede ripetadas specialan favoraton, kelkfoje kun domaĝa efiko. Ripeto povas esti arta rimedo, sed trouzo lacigas la leganton.

S. A. J.

DORMO-ĜENOJ ĈE ALT-AĜULOJ

De Dro Marék Antal

Tiel ĉe kreskajo kaj besto, kiel ĉe homo ekzistas la ritmo de tagoj kaj noktoj. La propreco de l'viva mondo estas, ke ĝi movas sin tage, laboras, kaj nokte ĝi kolektas forton por la posta tago. La homo povas vivi sen nutraĵo eĉ tutan monaton, sed sen dormo ne pli ol dek tagojn. La dormo estas ripozo de la cerbo, ĝi defendas la ĉelojn de l'cerbo kontraŭ troa lacigo. Intermitante la aktivecon de la nervo-ĉeloj, ĝi ŝirmas ilin kontraŭ elĉerpigo kaj pereco. Nenio pli pruvas la gravecon de la dormo, ol la fakto, ke oni hodiaŭ kuracas certajn malsanojn per ĝi.

Eraraj konsideroj

La ripoziga efiko de la dormo ne dependas de la tempa daŭro sed de ĝia profundeco. Dum la unua kvarono oni nur dormetas supraĵe, iom post iom la dormo profundigas kaj komence de la dua horo ĝi atingas la plejan profundon. Poste laŭgrade ĝi denove iĝas supraĵo.

La junuloj endormiĝas plej facile. Ili apenaŭ kuŝigis sian kapon kaj jam dormas. Sed la nervozulo malfacile forŝiriĝas de la kolora kaj incita mondo. Aĝuloj, eĉ se ili facile endormiĝas, vekigas post kelkhora dormo, kaj ne kapablas endormiĝi denove. Tial okazas, ke aĝuloj dumtage dormetas kelkajn horojn, por anstataŭigi la noktan dormomankon. Distastigis la erara afirmo, ke aĝaj kaj maljunaj homoj ne bezonas tiom da dormo kiom la junuloj. Tio ne ĝustas. Kiel ofte ni spertas, ke maljunuloj faliĝas la kapon kun la libro enmane, rigardante la televidon, en la kino, aŭ post la tagmanĝo en la fotelo. Aldonante ĉi dormetojn al la nokta dormo, oni konstatas, ke ankaŭ la aĝuloj dormas samlonge kiel la junuloj.

30 % de la 20—50 — jaruloj plendas pri dormo-ĝenoj. Tiu ĉi procento montras grandan kreskon post 50-jara aĝo. Tiam la aĝuloj vizitas sian kuraciston pro plej diversaj dormo-ĝenoj. La ĉefa parto de la maljunulaj plendoj temas pri malfacila endormiĝo kaj pri plurhora kuŝado sendorma en la lito. Aliaj plendas, ke ili vekigas frue kaj ne kapablas denove endormiĝi. Sed aperas ankaŭ tia formo de sendormeco, ke oni vekigas de temp'al-tempo dum la dormo kaj malfacile endormiĝas denove.

La kaŭzo de la sendormeco plej ofte fontas el nervozeco. Kiu ne spertis, ke la dumtaga ekscito influas la noktan dormon?

Kiel oni evitas dormoĝenojn?

Laŭ malnova sperto oni facile endormiĝas post peza fizika laboro. Intelektaj kaj aĝaj uloj pensiitaj agas saĝe, se ili lacigas sin, ĉar tiam ilia dormo iĝos pli profunda kaj ripoziga. Ĉi laciga maniero estas facila. Oni ne devas fari pli ol promeni duonan aŭ tutan horon antaŭ la kuŝiĝo. Dum la promonado povas solviĝi la problemoj kaj foriĝi la interna streĉo.

Zorgoj kaj streĉigoj ne evitas la maljunulojn. Ekscitojn sekvas ĝenoj dum la dormo. Aldone: la malagrabla ekscitigo altigas la sangopremojn, kaj la alta sangopremo ne ĉesas dum nia konscio sin okupas pri la kaŭzo de la ekscitigo. Tial estas rekomendinde — se eble — aranĝi la aperintan konflikton antaŭ la endormiĝo.

Ĉe aĝuloj la kafo favore influas la cirkuladon. Sed ne estas rekomendinde trinki kafon aŭ teon post frua posttagmezo, ĉar sekve de la malfrue konsumita kafo aŭ teo, la cerbo komencas pli intensan laboron spirantan, kaj la natura dormemo ĉesas. Ĉio ĉi okazas dum tre agrablaj sentoj, kaj kiam la individuo, sentema pri kafeino aŭ teino, enlitiĝas, la sonĝo evitas liajn okulojn.

Ĉe sendormeco agrabla solvo estas la varma bano, kiu lacigas kaj certigas bonan dormon.

Al frostemuloj kun malvarmaj piedoj oni rekomendas varmigan botelon, kiu estas laŭmoda en certaj landoj. Oni ne bezonas frotadi la malvarmajn membrojn dum horoj, oni endormiĝas baldaŭ.

Plia konsilo: se oni vekigas nokte, ne malfermu la okulojn, ĉar la lumo tra la okulnervoj incitas certan parton de la cerbo, poste la tutan cerban tavolon — kie okazas la misteraj fenomenoj de la memoro kaj forgeso — kaj oni tute vekigas.

Estas taŭge interrompi ĉiun spirantan laboron kaj dediĉi kvaronhoron al la silento. Tiam ni faru nenion, ni pensu pri la tagaj sukcesoj, kaj preparu nin por la venonta tago.

Tiu, kiu kutimas ekriprozi je la sama tempo, elektis la plej taŭgan manieron. Laŭsperte ni scias, ke ĉe endormiĝo post la kutima tempo, oni malfacile endormiĝas.

Ĉiu havas iun kutiman lokigon de la korpo, laŭ kiu oni facile endormiĝas. Surdorse kuŝante oni endormiĝas pli malfacile, sed surflanke kuŝante kaj malstreĉante la muskolojn, pli facile alvenas la dormo.

Laŭ la hungara proverbo; Kiel vi primetas vian liton, tiel vi dormos.

Oni devas krei hejme tiajn cirkonstancojn, kiuj taŭgas por atingi profundan kaj sanigan dormon. Nia lito estu laŭeble malmola, nia kovrilo malpeza, nia noktvesto leĝera.

Antaŭ la kuŝiĝo oni devas bone aerumi la ĉambron. Se ekstera bruo ne ĝenas la silenton de la ĉambro, plej taŭgas dormi ĉe malfermaj fenestroj, por certigi senĝenan provizadon de la koro per oksigeno.

Psikiatroj rekomendas, ke antaŭ la endormiĝo oni pensu je iu agrabla memoro, ĉar tia rememoro efikas dormige.

Iam la dormo estas tiel supraĵa, ke vekiginte post pluraj horoj oni ne volas kredi, ke oni dormis.

Laŭeble sen dormigilo

La lasta rifuĝo ĉe plidaŭra dormo-ĝeno estas la dormigilo. La dormigiloj efikas je la cerba tavolo. Iia elekto dependas de tio, ke la aĝulo malfacile endormiĝas, aŭ vekigas frue. Ĉe endormiĝa ĝeno oni aplikas rapide kaj mallonge efikan ilon, sed kontraŭ frua vekigo preskribas malrapide kaj pli daŭre efikan dormigilon.

Sed ni rimarku, ke dormigiloj estas danĝeraj iloj, kiuj efikas venenige je la organismo. La dormo atingita helpe de la dormigiloj ne egalas la premisojn de la natura ripozo. Post dormigilo oni ne vekigas freŝe. Kelktaga sendormeco ne sufiĉas por preni dormigilon. Ĉe daŭra sendormeco ni devas nin turni al kuracisto, ĉar ĉikaze povas ekzisti iu malsano en la fono.

Kaj fine: vekigante matene — ĉi tio koncernas aĝulojn — ni ne saltu rapide el la lito, sed malrapide, grad'al-grade, ni preparu nin por la kutima agado.

El la revuo "Magyar Hírek"
— Hungaraj Sciigoj — n-ro
25 1971 tradukis

Moto



"TEKNIKA KLARTEKSTO

De la altlernejo venis jaŭde depeŝo pri doktora disertacio. La populare vortigita mallonga raporto pri la enhavo sonis jene:

La disertacio traktas kelkajn novajn kupro-kaj arĝent-induktajn reakciojn. Fenilkupro kaj ciklopentadienilkupro reagis kun aromantikaj jodokombinaĵoj al biaritoj respektive arilciklopentadienoj. La reakcioj rigardiĝas kiel nukleofilaj substituaĵoj. Kupro-kaj arĝentorganikaj kombinaĵoj adicias ankaŭ al trinitrobenzo kaj donas Meisenheimerkombinaĵojn — mezproduktojn ĉe nukleofilaj aromatikaj substitucioj. Arĝentoksido katalizas adicioj de acidaj hidrokarbidoj kiel ciklopentadieno kaj indeno al trinitrobenzeno. La primare formitaj produktoj — Meisenheimerkombinaĵoj — povas esti protonataj al nitroacidoj aŭ oksidigi al trinitrobensenderivaĵo.

Pli klare oni ne povas diri."

Tradukis K. J. Moberg

NATURO RE-SANA!

*Eŭropo, Eŭrop! Nun kien celas
via kuro?*

Jen demando en nebula sunsubir'.

*Via kreo — la venenoj — ĉu strangol'
al belo kaj plezuro?*

Ĉu sufokos vin jam via propra spir'?

*La plej belajn el aleoj murdas plumbo,
karb-oksido*

— inter arboj marŝas la eksterm-korteĝ'.

*Velkas roz' Londona kaj lilio svenas
en Madrido,*

la violo plu ne floras en Lieĝ'.

Eŭropo, Eŭropo! Kien celas via vago?

Ĉu ne vekas vin sonoro de la mort'?

*Viajn ĉarmajn strandojn, mil alfluojn
de la mar' kaj lago*

vi makulis dum la jaroj de mon-fort'.

*Kie la river', brilanta kiel kara
juvelŝtono?*

Kie klaraj akvoj nun, kun pura fund'?

*Ce kloakoj lacaj fiŝoj turnas ventrojn
en la Rono,*

dronas en petrolo mevo en la Sund'.

Eŭropo, Eŭrop! Vekiĝu al puriga peno!

Vi kanzonu pri pli pura ter-medi'.

*Sonu kant' plej norde, kiel laŭ kajoj
de la Seno,*

lasu pepi ĝin Hanovre, en Evri'.

*Niaj parkoj ne plu mortos pro la
plumbo, karb-oksido.*

Intermonto kuŝos en matena freŝ'.

*Roz' ekfloros en London', lilio lumos
en Madrido,*

La viol' denove floras en Lieĝ!

Adriansson

Evri(o) = Evreux, franca urbo

Okaze de la Media Konferenco de la Unuigintaj Nacioj, okazinta en Stokholmo en junio, aperis en Göteborgs-Tidningen la supra poemo de la konato pseŭdonimo Adriansson. Kun afabla permeso de la aŭtoro, redaktoro **Sven Lantz**, ni publikigas la poemon, kiun tradukis **Gillis Staberg**. — Ĝi estas ankoraŭ aktuala!

JARKUNVENO EN LA SVEDA SEKCIO DE KELI

Dum kvar printempe belaj tagoj kvardek membroj de la Sveda sekcio de Keli kunvenis por jarkonferenco en Lundsbrunn, Vestrogotio, Ĉefparolanto estis pastro Hans A. Rosbach, Kristiansund, Norvegujo. Lia temo estis "Sopiro" kun la subtemoj Sopiro al Jesuo, Sopiro al vera riĉeco, Sopiro al la donacoj de la Spirito kaj Sopiro al la ĉielo. Laŭ peto de la ĉeestantoj la enhavo estos publikigita.

Pastro Rosbach, kiu apartenis al la Himnara Komisiono, kiu en 1971 publikigis la Evangelian Himnaron "Adoru Kantante", prezentis novajn kantojn el la himnaro. Akompanis Ingilil Drobný kaj Lennart Sundman.

Sabate vespere okazis publika diservo en la Misia Preĝejo de Götene kaj dimanĉe en la preĝejo de la konferencujo, kie pastro Rosbach predikis norveglingve. Gvidis Ingilil Drobný kaj Vilhelm Grahn.

Vendrede estis "kunveno kun varia programo". Tiam kelkaj ĉeestantoj prezentis bildojn el la vivo de Anna Alamo-Sandgren, kiu dum 25 jaroj estis vojaĝanta reprezentanto de la Sveda sekcio ne nur en Svedujo sed en tuta Eŭropo. La konferenca estrino Ragnhild Niklasson transdonis florojn kaj monsumon al Anna, kiu dankis kaj rakontis pri la pasintaj jaroj. Jam en 1947 ŝi faris sian unuan misian vojaĝon eksterlande. Ĉiuj, kiuj konas la laboron de Anna kaj ŝia edzo Karl-Olof, samopinias kun la parolanto, kiu diris: La kristanaj esperantistoj vere havas gravan taskon.

Dum la konferenco la Sveda sekcio de Keli havis jarkunvenon. De la prezidanto Ingvar Lagerström, kiu ne povis ĉeesti, venis skriba saluto kun bondeziroj.

Anna Alamo-Sandgren faris Funebran paroladon pri la membroj, kiuj por ĉiam forlasis la teran laborkampon. Inter ili estas la fama poetino Magda Carlsson-Bohman, kiu verkis multajn tekstojn en Adoru Kantante.

Karl Buremo kaj Karl-Olof Sandgren faris la jarraporton kaj Anna Hedin la kasraporton. Ambaŭ estis kun danko aprobitaj. Ragnhild Niklasson dankis la estraron. Recipe ŝi turnis sin al Vilhelm Grahn kaj Evert Carlsson, kiuj forlasis la estraron. Novelektitaj estis Birgitta Ahlén kaj Britta Rehn.

La aŭtuna konferenco okazos en Götabor Missionsskola, Kumla, 13—15 okt. Eble la venontjara konferenco povos esti sur la insulo Åland inter Finnlando kaj Svedujo fine de majo.

Signalvorto por la nova jaro: Petu de la Eternulo pluvon printempan!

El Lo.

LA MONDFEDERALISTOJ DEZIRAS REFORMON DE LA UN-STATUTO

Dum la semajnofino 4—5 de marto okazis en la dana parlamentejo Christiansborg norda konferenco pri UN-demandoj. La norda konsilantaro de la mondfederalistoj aranĝis kaj invitis idealismajn, fakajn kaj politikajn organizaĵojn en Danlando, Norvegujo, Svedujo kaj Finnlando.

La unuan prelegon faris ambasadorino Inga Thorson, Svedujo, kiu parolis pri "La Nordo, UN kaj la kvara mondo". Ŝi substrekiis, ke la grandaj mondproblemoj (la malpurigado de akvo kaj aero, la kreskanta loĝantaro de la tero, la malriĉeco en la evoluantaj landoj) estas interligitaj kaj kreas problemaron, kiun ni homoj nepre solvu. La nacia suvereneco ofte malhelpas racian solvon.

La malgrandaj ŝtatoj de UN deziras reformon de la statuto, kaj la membroŝtatoj devas sendi siajn vidpunktojn al UN antaŭ la 1-a de julio 1972.

Profesoro Ole Karup Pedersen, Danlando, prelegis pri la agado de UN por protekti la pacon, kaj profesoro Torkel Opsahl, Norvegujo, pri la homaj rajtoj. Diskutoj sekvis ĉiun prelegon.

Fine la ĉeestantoj akceptis rezolucion, kiun oni transdonos al la registaroj de la nordaj landoj, kiuj sendos siajn vidpunktojn al UN.

La ĉeestantoj esprimis sian deziron, ke UN estu pli forta kaj fine fariĝu monda registaro. UN bezonas pli precizajn statutojn pri la agado por protekti la pacon. La konvenciojn pri la homaj rajtoj la membroŝtatoj devas rapide ratifi. (Multaj ŝtatoj akceptis la konvenciojn sed poste ne ratifis ilin! Tio ja estas tute ne kontentiga.)

Esperantistoj, kiuj deziras kontakton kun la mondfederalista movado, povas skribi svedlingve (ev. menciante tiun ĉi artikolon) al Hans Regnell, Tornaplatzen 2, Lund.

El Lo.

6 lernantoj (4 virinoj kaj 2 viroj) en la Esperanta Studrondo de Frånö (Svedujo) deziras korespondi kun esperantistoj el ĉiuj landoj per poŝtkartoj kaj leteroj. Certe respondos.

Adreso: S-ro Väinö Ölund,
Fornvägen 13
872 00 Kramfors.
(Svedujo)



El la diskutoj en Västerås ni ricevis la suprajn bildojn. Maldekstre Karl Söderberg, Uppsala, kaj Olle



Olsson, Lund. Dekstre plej proksime al la fotisto ge-sroj Lagerkrantz, Falun, kaj Ingvar Eriksson, Falköping.

LA TASKOJ DE ESPERANTO-KLUBO

Antaŭ la dua mondmilito, en la jaroj 1920—1939, la kluba agado estis multe pli vigla ol nun. Ni havis sufiĉe stabilajn klubojn kun multaj membroj, kaj ne estis malfacile aranĝi allogajn kunvenojn. Venis ofte gastoj, la sindiko de SEF, eksterlandaj prelegantoj, migrantoj, muzikantoj k. t. p. Ofte ni kontentiĝis per lokaj kontribuoj, trinkis kafon, kantis, dancis kaj dum agrabla kunestado ekzercis Esperanton.

Tiu malnova formo de klublaboro ne plu estas taŭga. La tempo ŝanĝiĝis. Multaj kluboj mortis, aliaj malgrandiĝis je anaro. Bedaŭrinde ni devas ankaŭ konstati, ke la membroj maljuniĝis, kaj gejunuloj malofte aliĝas.

Do estas necese pripensi la nunajn eblecojn por kluba laboro, ĉar la kluboj ankoraŭ estas necesaj por nia movado.

La unua tasko estas nun kiel pli frue kunligi la esperantistojn en unu loko aŭ regiono. Regulaj kunvenoj almenaŭ monataj estas gravaj ankaŭ se ili ofte havas la plej simplan formon de nur kamarada kunesto ĉirkaŭ la kaftablo. Sed tamen ne forgesu paroli esperanton!

La klubo devas ankaŭ esti centro por la regiona informado al eksteruloj pri nia lingvo kaj movado. Estas nia kulpo ke multaj eĉ bonedukitaj homoj eĉ ne scias, ke Esperanto ekzistas.

Bedaŭrinde la eksterlandaj vizitantoj nun ne estas same oftaj kiel antaŭ la milito. Sed certe estas eble stimuli ilian intereson, se ili scias, ke ekzistas kluboj, kiuj bonvole akceptas ilin. Ankaŭ kluba tasko!

Ĉiam kiam estas eble ni aranĝu publikajn aferojn, kiuj povas esti allogaj ankaŭ por neesperantistoj, ekz. prelegoj, koncertoj, filmprezentadoj, ekspozicioj, solenaĵoj lige al La tago de la libro, La tago de UN, La semajno de Internacia Amikeco k. t. p.

Estas grave ke ni ankaŭ en la ĉiutaga vivo rememorigas niajn kunhomojn pri nia ekzisto. Por tiu celo ni devas havi iun specon da konstanta informilo, anoncfenestron, afiŝtabulon aŭ almenaŭ ŝildon.

Malmultaj kluboj estas sufiĉe fortaj por havi propran ejon. Sed ni esploru la eblecon havi komunan ejon kun aliaj malgrandaj grupigoj kun similaj internaciaj celoj. Povas esti eble en multaj rilatoj kunlabori kun ekz. lokaj UN-rondoj, Internacia Virina Asocio por Paco kaj Libero, IOGT- kaj NTO-logioj, religiaj grupoj k. t. p.

Pli malfacile sed certe efika estus stablo de iaspeca entrepreno kiel libro- aŭ papervendejo, kiosko, migranthejmo, kafejo aŭ eta hotelo. Fine ni ne forgesu la signifon de persona influo. Se ĉiu esperantisto ĉiujare elektas unu-du personojn, kiujn li konstante informas-persvadas, ni ĉiujare proksimume duobligos nian anaron.

ĈU "NACIO ESPERANA"?

La artikolo de S. A. Jacobson en nro 3 de La Espero estas interesa sed apenaŭ realisma. Aludante tiun artikolon la redaktoro diras, ke ni ne forgesu ke "nia lingvo mem estas kuraĝa ideo de kuraĝa homo". Jes, sed Zamenhof tamen havis konkretan proponon. Lia lingvo estis jam preta. S. A. Jacobson faras la proponon sed li ne konkretigas, kiamaniere ĝi estu efektiva. Ĉu ni nur simple proklamitu ke la esperantomovado ek de nun estu aparta nacio? Tia paŝo certe nur ridindigus nian aferon.

Sed estus verŝajne damaĝe forĵeti la tutan ideon de Jacobson kiel senencaĵon. La artikolo tamen instigas al novpensado. La ideo ke la reprezentantaro de la Unuigintaj Nacioj konsistu ne nur de suverenaj ŝtatoj kun propra teritorio sed ankaŭ de internaciaj organizaĵoj aŭ de iu nova organiza konstruo, kiu kunigus kelkajn internaciajn organizaĵojn, tiu ideo estas pripensinda. Estas eĉ eble, ke tia kunlaboro inter kaj kreskanta influo de certaj organizaĵoj estas jam survoje. Eble Jacobson en tiu rilato antaŭvidas ion, kio venos.

Se estas tiel, tiam eble devus esti unu el la ĉeftaskoj de la esperantomovado esti inter la pioniroj sur tiu nova kampo. Sed tio estas io, kion ni ne povas realigi per propraj fortoj. Tiam ni devas labori je la aliaj organizaĵoj, kaj se ni volas atingi rezultojn, ni devas unue konkretigi kion ni fakte volas kaj kiamaniere tion efektivigu.

RS

Sven Jönsson

MIRINDA VIVOSORTO



Samideano S. Hilding Svensson, Norrviken, mortis komence de la somero, 78-jara.

Hilding Svensson, metallaboristo kaj ekstra oficisto de la ŝtata arkivo, estis neordinara homo sed tre modesta, kaj eĉ inter la sveda esperantistaro la grandeco de lia vivo kaj verkado ne estas sufiĉe konata. Tiu ĉi tial ne estas ordinara nekrologo; ĝi estas rakonto pri homo, kiu sen iaj universitataj studoj — li lernis nur en ordinara popollernejo, — komencis kaj sukcese finpretigis laboron, kiu faris lin egalulon al gravaj sciencistoj.

La historio komencis jam en la jaro 1661, kiam svedo nomita Swanhelm vizitis Anglujon pro reĝa komisio. Tie li lernis stenografion laŭ la sistemo de Shelton kaj fariĝis la unua stenografisto de Svedujo. Swanhelm poste fariĝis sekretario de la sveda reĝa konsilantaro kaj dum 17 jaroj li stenografe notis la pritraktadojn de la konsilantaro, kiu estis

samtempe registaro kaj plej alta tribunalo.

La stenografajoj poste venis en kelon de la reĝa palaco en Stokholmo, kie ili restis forgesitaj dum pli ol 200 jaroj. En la jaro 1889 trovis ilin Sam Clason, parlamenta stenografisto — ministro — ĉefo de la ŝtata arkivo. Li provis ilin interpreti sed malsukcesis kaj rezignis. Kie li malsukcesis, tie sukcesis Hilding Svensson.

Hilding Svensson frue interesiĝis pri Esperanto, lernis la lingvon kaj ekkorespondis kun esperantistoj en la tuta mondo. Li trovis, ke ordinara skribo postulis tro da tempo kaj ek-lernis stenografion. En iu revuo li trovis artikolon pri la stenografaj protokoloj de Swanhelm kaj fotografitan paĝon el ili. Hilding Svensson sukcesis interpreti la paĝon, kaj la sciencistoj interesiĝis pri li. Oni permesis al li provi interpreti parton de la originalo. Hilding Svensson — kiu konis nek la svedan lingvon de la 17-a jarcento nek latinon — brile sukcesis. Tiutempe li ankoraŭ laboris kiel metallaboristo en lampfabriko.

La ŝtata arkivo sukcesis post iom da tempo — tio okazis antaŭ du jardekoj — akiri la permeson de la parlamento dungi Hilding Svensson por interpreti la kompletan kolekton de stenografaj protokoloj de Swanhelm. Dum tiu labro li fariĝis bona eksperto pri la 17-a jarcento kaj la politikaj cirkonstancoj en Svedujo tiutempe, kaj li fariĝis konsilanto al multaj historiistoj kaj tre respektata en sciencaj rondoj. Lia laboro nun estas finita kaj la protokolaro preta por publikigo.

"Hilding Svensson estis", skribas en memorartikolo en Dagens Nyheter

Ciujare la Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti, en valoro de **1.000 BF** (20 us. Dolaroj) al elstara artikolo originala aŭ tradukita, pri la tre generala temo "Naturo". Por 1972 partoprenis en la konkurso ĉi sekvaj tri kandidatoj, el kiuj la unua nete gajnis:

L. K. Hunnes el Norvegio kun "La granda Aŭko"

R. de Roover el Belgio kun "Bubuĉjo, la Noktuido"

J. Lazauskas el Litovio kun "Urogalo en Litovio".

Ciuj artikoloj aperas konforme al la regularo en "La Mevo", organo de ORE, kaj rajtas pritrakti iun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1973 bnvolu peti regularon de la sekretario M. Halvelik.

KONKURSO SIMONDETTI

p/a Manuel Halvelik
Gebr. Blmmestraat 41/0
B-2200, Belgio

FERVOJISTA KONGRESO 1973 EN ARHUS, DANLANDO

FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO 1973 okazos 12-a—18-a majo 1973 en Arhus, Danlando.

La turistasocio en Arhus financis eldonon de broŝuro en Esperanto.

Informoj pri la kongreso estas haveblaj ĉe adreso: 24-a IFEF-kongreso, Assensgade 18, DK 8000 Arhus C, Danlando.

la 19-an de junio Ingvar Andersson, pli frue ĉefo de la ŝtata arkivo kaj mem historiisto, 'la tipo por esploristo, li laboris en trankvilo sed tre persiste, kaj ofte li pleniĝis tute de la sveda medio de la 17-a jarcento."

Ake Blomberg

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

HÖSTENS KURSER STARTAR!

Esperantoförlaget föreslår:

NYBÖRJARKURSER

Kurser i Esperanto bör i år startas i alla föreningar. En enskild medlem kan lätt få igång en **studiegrupp** genom att intressera några arbetskamrater eller goda vänner. För alla slag av kurser finns läromaterial:

ALLAS ANDRA SPRAK ESPERANTO

(E. Malmgren) 8:—
Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser. Läraren kan helt följa läroboken.

ESPERANTOKURS (F. Lindén) 9:—
Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Särskilt användbar i kurser, där deltagarna önskar ingående studier i Esperanto eller har tidigare språkundervisning. Denna lärobok kräver något mer förarbete av läraren.

ESPERANTO PER POST

Korrespondenskurs (10 brev) 8:—
Instruktiv, lättfattlig, intressant. Går utmärkt att använda som kursmaterial. Kursdeltagare sänder genom ledaren gemensamt in lösningarna till Esperantoförlagets rättare. Undervisande lärare krävs således ej för denna kurs. En kunnig kursledare kan naturligtvis även själv rätta lösningarna. Var god meddela vid beställningen hur kursen lägges upp.

INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva, med texthäfte 5: 75
Modern 33-varvs grammofonskiva, intalad av flera kända internationella röster. Bra hjälp i en nybörjarkurs för inlärandet av rätt uttal.

KORRESPONDERA MED HELA VÄRLDEN (R. Pehrsson) 2:—
God hjälp och ledning för en nybörjare. Exempel på brevformulering från enkla hälsningar till mera avancerad skriftväxling.

SVENSK—ESPERANTISK PARLÖR (R. Pehrsson) 1:—

SVENSK—ESPERANTISK ORDBOK, Häft. (S. O. Jansson, F. Lindén, B. Gerdman) 18:—
Fullständig ordbok med många exempel.

ESPERANTO—SVENSK ORDBOK (P. Nylén) 16:—

LILLA ORDBOKEN (E. Vilborg) 12:—
Behändig och modern Svensk—Esp. och Esp.—Svensk fickordbok.

EL LA VIVO DE L. ZAMENHOF (G. Henriksson) 2: 75

Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare. En "obligatorisk" bok för alla kursdeltagare. Vidare föreslår vi:

KORRESPONDENSANNONS förmedlas av Esperantoförlaget i internationell tidning (Heroldo) 6: 75

Sådan annons kan sättas in redan efter någon månad. Eftersom det sedan dröjer ung. 1 månad innan tidningen med annonsen kommer ut, kan kursdeltagare vid den tidpunkten mycket väl föra en enkel korrespondens, t. ex. per vykort. Detta stimulerar och ger bevis på Esperantos användbarhet.

Sådana annonser förmedlas givetvis även till andra internationella tidningar, t. ex. Revuo Esperanto. Priserna varierar.



Kursledarna och lärarna bör stimulera elevernas intresse för egen läsning. Detta ger vana och gott ordförråd. Förslag till lätta läseböcker finns i UEA:s årsbok, boklistan. Vi skaffar allt som önskas.



FORTSÄTTNINGSKURSER

Delar av nybörjarkursen bör snabbrepeteras. Därefter kan man **noggrant** genomgå

SVENSK ESPERANTO GRAMMATIK (E. Carlén) 15:—

Dessutom bör en intressant bok läsas och diskuteras. Boken skall väljas efter kursdeltagarnas förkunskaper.

Som första bok föreslår vi:

VIVO VOKAS (S. Engholm) häft. 7: 50 inb. 10:—
En originalroman om ungdom på utomordentlig Esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser.

OBS. På alla beställningar utom korrespondenskurser tillkommer moms 17,65 proc. Vi sänder gärna mot postförskott.

Andra förslag:

LA GRANDA AVENTURO (F. Szilágyi) häft. 7: 50 inb. 10:—

Trevliga och underhållande noveller, orig. Esp.

NORMANDAJ RAKONTOJ (G. de Maupassant) 22:—

Berättelser från Normandie, övers. R. Dupuis. För mer Esperantokunniga.

För övrigt kan alla Esperantoförlagets utgåvor rekommenderas för såväl gott språk som intressant innehåll. Boklista sändes gärna på begäran.

Förlagsföreningen Esperanto

Fack

200 42 Malmö 7. Postgiro 578-5

UNESKO-NOVAĴOJ

LA PESTO DE LA POLUCIO
ATINGAS AFRIKON



Kelkajn aspektojn de ekologia difektigo oni pritraktas en diversaj proponoj, kiujn nunstudas afrikaj registaroj. La proponojn oni faris dum seminario, kiun organizis Unesko, kaj kiu okazis la pasintan decembron en Nairobi. Ekspertoj el dek du landoj, kunveninte en Nairobi rimarkigis, ke la malbonigo de la afrikaj flaŭro kaj faŭno rezultas ĉefe el malsaĝaj agrikulturaj kutimoj, kiujn oni praktikas jam dum multaj jaroj. Aldone al ĉi tiuj malfavoraj faktoroj, aliaj tipoj de danĝeroj al la medio lastatempe rimarkigis en Afriko, nome la polucio de la aero, akvo kaj grundo pro la uzo de venenaj, kemiaj kontraŭpeŝtaĵoj.

Studoj pri la malbonaj efikoj de apartismo

La minaco pri perforta konflikto interrasa en Sudafriko estas des pli grava pro la fakto, ke la subpremita popolo de tiu lando nun konvinkigis, ke ĝiaj rajtoj estas atingeblaj nur per armita lukto kaj subteraj aktivecoj. Jen la konkludo de specialistoj de Unesko el iliaj studoj pri tio, kiel aplikigas la politiko de apartismo de la Sudafrika registaro. Unesko ĵus publikigis tiujn konkludojn en reviziita kaj pligrandigita dua eldono de sia raporto pri "Apartismo, ĝia Efiko je Eduko, Scienco, Kulturo kaj Informado", unue eldonita antaŭ kvin jaroj.

La libro estas rezulto de studoj efektivitaj de la sekretariato de Unesko laŭ peto de Unuigintaj Nacioj. Ties celo, laŭ la libro, estas frontigi la praktikon kaj politikon de la Sudafrika registaro "al diversaj internaciaj normoj de konduto, al kiuj Unesko estas kaj leĝe kaj morale dediĉita".

La studo montras, ke en Sudafriko oni utiligas la edukpolitikon por puŝi afrikanojn en la plej malaltajn poziciojn en la socio. Tamen, estas ne nur la afrika loĝantaro, kiu influigas: ĉiuj infanoj, negrave de kiu koloro, suferas doktrinigon per idealologio, kiu estas al la moderna mondo tute neakceptebla.

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA)

Unesko kreas Eŭropan Centron por altgrada eduko

Eŭropa Centro, kiu kunigos kaj kunordigos informojn pri ĉiuj problemoj de la altgrada instruo, ekfunkcios en Bukareŝto en la venonta septembro, sub aŭspicio de Unesko. Tiu Centro inciatos la interŝanĝon de universitataj instruistoj inter la eŭropaj landoj, kaj entreprenos studojn pri la novigaj aspektoj de la altgrada instruo.

Renkontigo Sthlm—Turko 28—29 oktobro

Komuna renkontiĝo inter finnlandaj kaj svedaj esperantistoj — io simila al dan—sveda esperantorekontiĝo — okazos 28—29 oktobro 1972.

Svedoj esperantistoj veturos per ŝipo el Stokholmo vespere 27/10 kaj alvenos en Turku 28/10 je la 8-a horo matene. Dum la tuta tago ili estos gastoj de la esperantistoj de Turku. Vespere je la 22-a horo okazos la reveturo, kaj tiam finnlandaj esperantistoj kunventuros por esti la gastoj de la stokholma klubo en la dua tago, 29/10.

Svedoj bv turni sin al s-ro Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten, 08/46 29 95 por informoj. (Finnoj kontaktu sian sekretarion, s-ro J. Ahomäki.)

Esperantotagoj en Skövde 7—8 oktobro

Sabate 7/10: 40-jara jubileo de la Klubo Esperantista de Skövde. Festparolado, distra programo, muziko.

Dimance 8/10: Aŭtuna renkontiĝo de la Skaraborga Distrikto. Laŭ provizora programo okazos diskutado pri **informado**. Enkondukos **Franko Luin** (provizora interkonsento). Gruplaboro.

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Ĉefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv.kr. (poŝtĉeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180: —, 1/2 = 90: —,

1/3 = 60: —, 1/6 = 30: —, 1/12 = 15: —.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanconco: 25-vorta = 4: —, 50-vorta = 8: —.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströenne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Kasisto: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578-5.



Administranto: Anna-Greta Ströenne

Tel. hejma 040/12 92 11

Prez. Sven Sjöblom